

KONTAKTO

numero 153 (1996:3)

Kiel kuba vilaĝo
venkis kontraŭ

DEMONINVADO



Daŭras la batalo de
**LA INDIĜENAJ
POPOLOJ**

ŜAMANISMO

La indiĝenaj popoloj	Sophie Boukhari (el UNESCO Courier)	2
Ŝamanismo	Bernard Golden, Hungario	4
Kial zebroj havas striojn?	Robert Roze, Francio	6
Ekzerci pri ĝojo	Antoine K. Kouablan, Ganao	8
Krucvorto	Lena Beresneva, Rusio	8
Irina Aleksejeva	Redakcio	8
La ruza fianĉo	Kizeyidioko Mayinda, Zairio	8
Bajkalo, koro de Siberio	Irina Aleksejeva, Rusio	10
Patro de Solaris	Claus Günkel, Germanio	12
La enigmo	Stanislaw Lem, trad. Claus Günkel	12
Demoninvado	Alberto García Fumero, Kubo	13
Satano ekzistas	Jordi Pla i Tauró, Barcelono	14
Mia unua fojo...	(el JEUNESPÉRANTO-INFO)	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 153 (1996:3), 33-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44

☎ +31 10 436 17 51

☐ uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Abel Machado dos Anjos (Brazilo)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Zoran Ćirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Gbeglo Koffi (Togolando)

Bernard Golden (Hungario)

Claus Günkel (Germanio)

Kizeyidioko Mayinda (Zairio)

Ulrich Matthias (Germanio)

Atilio Orellana Rojas (Argentino)

Ōshō-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)

Anna Rachón (Pollando)

Robert Roze (Francio)

Ūatanabe Kei (Japanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy

Prolegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel


Facillingvaj artikoloj estas verkitaĵ en la niveloj *tre facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de **KONTAKTO**. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujara.

Anoncarifoj:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakviriĵaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajn de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



enkonduko

Vi certe ĝojas, ke tiu ĉi numero atingas vin tiel baldaŭ post la antaŭa. Ankaŭ n-ran 4 vi ne bezonos atendi longe. La ĉefa kulpo de la malfruoj kuŝas ĉe mia alia laboro, nome la Jarlibro, kies pretigo ĉi-jare postulis multe pli da laboro ol kutime. Kiel vi eble scias, ĉiuj 2166 delegitoj de UEA devis doni signon pri aktiveco, se ili volis resti en la Delegita Reto. Tiu reviziado signifis ekstran laboron, sed bonŝance ĝi ne estas ĉiujara.

Certe ankaŭ vi jam ricevis vian Jarlibron kaj konstatis, ke 1830 delegitoj sukcesis en la "ekzameno". Sed... kial estas nur 68 junularaj delegitoj? TEJO-anoj estas 10% de la UEA-membraro. La nombro de junularaj delegitoj devus esti preskaŭ trioblo de la nuna nombro. Do, kial vi ne tuj skribu al via ĉefdelegito por diri, ke vi deziras esti JD?

Francis

La indiĝenaj

Indiĝenoj paŝas antaŭen en organizaĵoj kiel Unesko, sed ilia batalo por mem-rego ankoraŭ furiozas en la batalkampo.

“Antaŭ dek jaroj neniu parolis pri indiĝenaj popoloj. Sed hodiaŭ ni estas tie ĉi ĉe Unesko. Multaj el ni ne plu estas vidataj kiel muzeaĵoj, sed kiel grandaj pensistoj”, rimarkigas Rigoberta Menchu Tum, gvatemala majaa indianino kaj gajninto de la Nobel-premio pri Paco en 1992, alparolante la duan asembleon de Indiĝena Iniciato por Paco (IIP), efektiviĝanta en Parizo en februaro de la pasinta jaro.

La unua indiĝena movado elsaltis en Usono en la fruaj 1950-aj inter la “radikalaj urbaj indianoj” dum la vekiĝo de la civilrajta nigra movado, klarigas Julian Burger, sekretario de la Labor-grupo de UN pri Indiĝenaj Popoloj. Poste, kiam oni komencis ekspluati minejojn kaj arbarojn en Latinameriko, ĉefe en Amazonio, indianoj kuniĝis tie por protesti kontraŭ disvolviĝ-projektoj, kiuj minacis ilian medion kaj vivmanieron. Tiun vojon sekvis aziaj indiĝenaj popoloj en la 1970-aj.

En Afriko, tamen, la movado estas ankoraŭ tre malgranda. “Oni vidas nur individuajn sindefendojn tie ĝis nun”, Burges diras. “Pasintjare, ekzemple, maroka berbero vizitis la renkontiĝon de la Labor-grupo. Tamen, estas ankaŭ la bocvanaj boŝmanoj, kiuj kvankam estante ne pli ol 1 000, sukcesis gajni rezervejon por si.”

La Sub-Komitato pri Homaj Rajtoj de UN komencis rigardi la indiĝenajn popolojn en la 1970-aj. Permite de indiĝenaj grupoj kaj NRO-j (Ne Registaraj Organizaĵoj), ĝi starigis la Laborgrupon en 1982. “En la unua renkontiĝo estis nur manpleno da aŭstraliaj aborigenoj, gvatemalaj majaoj kaj indianoj el Usono kaj Kanado”, diras Burger. “Hodiaŭ, estas pli ol 800 reprezentantoj.”

La renkontiĝo de 1982 produktis provaĵon de Deklaracio, kiu agnoskis la rajton de indiĝenaj popoloj je mem-decido kaj rego de la uzo de siaj pralandoj. Ĝi ankaŭ rekonis iliajn kulturajn rajtojn, aparte pri plurlingva edukado. En 1989 la Internacia Labor-Organizo (ILO) adoptis sian Konvencion 169 pri indiĝenaj kaj tribaj popoloj. “Sed tre malmultaj landoj ĝin ratifikis ĝis nun”, plendas Myrna Cunningham, Miskito-ano de la Nikaragva Nacia Asembleo, kiu prezidis la asembleon de IIP en 1995. Multaj registaroj ankoraŭ neas la ekziston de indiĝenaj popoloj en sia teritorio kaj anstataŭe parolas pri malplimultaj aŭ popolgrupoj. “UN agnoskas la rajton je memdecido de popoloj pli facile ol de malplimulto”, diras Burges. Li pensas, ke la batalo por adoptigi la Deklaracion nur ĵus komenciĝis.



Tiu ĉi knabo kajapoo el Amazonio rajtas je sia tero.

aj popoloj

Kiu ŝatus apliki la Deklaracion? Jen demando farinda, ĉar ne ekzistas klara difino de "indiĝenaj popoloj". Ibrahim Fall, kunordiganto de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Popoloj (1995-2004) diras, ke ili estas homoj, kiuj "ĉiam vivis, kie la destino metis ilin antaŭ ol alia popolo alvenis en la scenejon por vivi ĉe ilia flanko, bedaŭrinde ofte enmarĝenigante ilin tiom, ke nun ili sentas sin fremduloj en sia propra lando."

Por Menchu ili estas simple "aŭtoktonaj" kaj "koloniitaj" popolo, "kies sociaj rilatoj radikas en kulturoj milojn da jaroj malnovaj". Sed se facilas fari tiun ĉi distingon en Latinameriko, Nov-Zelando aŭ Aŭstralio, kie eŭropaj koloniantoj restis, pli malfacilas en Azio kaj Afriko. "Koloniado" temas ne nur pri eŭropa dominado, diras Burger. "Ekzistas ankaŭ interna koloniado". Alia demando: ĉu mestizoj estu konsiderataj indiĝenaj? Landoj kiel Aŭstralio diras, ke homoj estu tio, kio ili mem sin difinas.



Rigoberta Menchu Tum,
Nobelpremiito pri Paco
en 1992.

Malpura milito

ILO diras, ke estas ĉirkaŭ 300 milionoj da indiĝenoj en proksimume 60 landoj en la tuta mondo. Cunningham levas la nombron al 400 milionoj kaj Tauli C. Victoria, de la Alianco de la Filipin-Kordilera Popolo asertas, ke estas 300 milionoj sole en Azio. Dum tiuj ĉi diskutoj ruliĝas en internaciaj konferencoj, dueloj daŭras sur la batalkampo inter registaroj kaj indiĝenaj popoloj.

"Se vi deziras vidi karenon en la jaro 2000, vi devos iri al muzeo", diras reprezentanto parolanta pri la "malpura milito" inter la popolo Karen kaj la reĝimo en Ranguno (eksa Birmo). En Bangladeŝo, li diras, la 300 000 ĉakmaoj en la montetaroj de Chittagong vidis "trupojn invaditan teron post la sendependiĝo de la lando kaj fari terurajn masakrojn". IIP denunciis seriozajn perfortojn al homaj rajtoj en Orientaj Timoroj okupitaj de Indonezio. En Hindio, la registaro rifuzis la postulojn de 70 milionoj da "Adivasi" (kio signifas "la unuaj loĝantoj"). Ĵusa publika paca manifestacio en la ŝtato

Maharaŝtro finiĝis per preskaŭ 100 mortoj. Nabin Mundu diras, ke modernigo kaj eltirado de ter-riĉaĵoj senradikigis 22 milionojn da homoj ekde 1950. Preskaŭ 40% el la forĵetitaj estis indiĝenoj, kiuj konsistigas iom malpli ol 8% de la loĝantaro.

Aziaj registaroj ne deziras agnoski la rajtojn de indiĝenaj popoloj ĉar ili prezidas super kunfliktitaj landoj kaj timas malfermi pandoran skatolon, diras Burger.

Tamen en Filipinoj, diras Victoria, la indiĝenaj movadoj kreskis pro la plano de la Monda Banko konstrui baraĵon. "Ni vidis ĝin kiel la finon de nia mondo, do ni batalis ĝis la Banko retiriĝis de la projekto. Ekde 1987 la konstitucio rekonas niajn rajtojn, sed la registaro ne lasas al ni regi niajn terojn kaj preferas multnaciajn entreprenojn. Tial ni kontraŭstaras ĉie la tutmondigon de la ekonomio".

Ĉu **KŬIANTO** plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto – abonnu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!

Aŭstralio	31 dolaroj
Aŭstrio	245 ŝilingoj
Belgio	765 frankoj
Brazilo	20 guldenoj
Britio	16 pundoj
Danio	150 kronoj
Finnlando	115 markoj

Francio	125 frankoj
Germanio	37 markoj
Hispanio	2300 pesetoj
Israelo	32 guldenoj
Italio	3400 lirej
Japanio	2880 enoj
Kanado	31 dolaroj

Nederlando	41 guldenoj
Norvegio	150 kronoj
Pollando	20 guldenoj
Portugallio	2500 eskudoj
Svedio	185 kronoj
Svislando	31 frankoj
Usono	23 dolaroj

Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

"En Nikaragvo", diras Cunningham, "la registaro garantiis la aŭtonomion de miskitoj en 1987. Ni havas nian propran lokan registaron kaj regionan parlamenton, administras niajn proprajn edukadon kaj san-programojn kaj konstruas nian propran universitaton. Sed ni ankoraŭ ne regas la naturajn riĉaĵojn de nia teritorio".

En Latinameriko, ŝi diras, la malfeliĉo de la indianoj estas plej granda en Chiapas (Meksiko), Peruo, Ekvadoro kaj Gvatemalo. "Ili pensas, ke ni estas subklasaj homoj prokras-tigantaj la nacian disvolviĝon", diras Antonio Hernández Cruz, membro de la Meksika Ĉambro de Deputitoj. "Multaj el ni kontraŭis land-reformojn faratajn de la registaro pro la ligo kun NALKA (Nordamerika Liberkomerca Asocio). Ĉefe tial okazis la sangoplena subpremo de la kamparana ribelado en Chiapas."

Rilate al Gvatemalo — kie laŭ la eldiroj de Menchu majaoj konsistigas 65% de la loĝantaro — José Ángel Zapeta denuncas la perfortan enkondukon de infanoj en la armeon. Jorge Machas Atz parolas pri la rutina rasismo de civilservantoj, la malpermeso surhavi tradiciajn vestaĵojn en lernejoj kaj la enmarĝenigo de indianaj lingvoj. "Multaj indianoj adoptis obeeman sintenon", li diras.

La inuitoj de Groenlando estas malofta ekzemplo de indiĝena popolo, kiu regajnis la regon de la naturaj riĉaĵoj en siaj teroj. "Mem-regado kaj konstitucio por 55 000 inuitoj de Danlando estis aprobita en 1979", diras Tove S. Petersen, kiu vidas tion kiel "sen-perfortan revolucion".

"Hodiaŭ ni havas nian propran registaron, elektas nian propran parlamenton kaj funkciigas niajn proprajn aferojn. Sub speciala interkonsento inter niaj du registaroj, la eltirado de oleo, natura gaso kaj mineraloj devas esti kune interkonsentita. Ni ankaŭ kalkulas, kiel dividi la gajnojn. La historia kontraŭseno estas, ke ekonomio kaj socia modernigado akceliĝis de kiam ni atingis la mem-regon."

Jen bona leciono por tiuj, kiuj asertas, ke indiĝenaj popoloj interesiĝas nur pri vivado en la pasinteco.

Sophie Boukhari, el UNESCO SOURCES n-ro 67, marto 1995

La ideologia premiso de ŝamanismo estas la ekzisto de supernaturaj mondoj (la supra, ĉiela mondo kaj la submondo) kaj la eblo starigi kontaktojn kun iliaj loĝantoj. La praktikisto de tiu religia sistemo estas la ŝamano, viziulo, kiu agas en la nomo de la komunumo kiel peranto inter homoj kaj dioj kaj spiritoj de tiuj eksterteraj regionoj. La esenca ŝamana tekniko estas trapaso de unu kosma eblo al alia, de la tero al la ĉielo aŭ, inverse, de la tero al la subtero. Li kapablas rilati kun la supernaturaj mondoj dank' al inspiro donita al li fare de liaj spirit-helpantoj, kiuj manifestiĝas dum spirit-flugo, kiam, post ekstaziĝo kaj ektranco, lia animo laŭvole forlasas la korpon.

La celoj de la ŝamano estas efektiviĝi fizikan kaj spiritan kuracadon, plibonigi veterkondiĉojn, sukcesigi ĉasadon kaj antaŭdiri la estontecon. Ŝamanoj diferencas de pastroj de aliaj religioj, kiuj nur scias kaj praktikas ritojn por la tuta tribo aŭ socio. Male la ŝamano *senpere* faras kontakton kun la supernaturo kaj *persone* agadas sur la alimondaj ebloj, ĉar li scias, kiel fari la trarompon kaj iradas tien en spirita formo. Pritraktado de ŝamanismo en ordinara, ĉiutaga lingvo ne konvenas; oni devas uzi ĝiajn mistikajn esprimmanierojn.

Ŝamanismo en la homa kulturo

Ŝamanismo aperis tre frue en la historio de la homaro. Ĝiaj radikoj datiĝas de la supera paleolitiko, kaj la adepto disvastiĝis sur la tuta planedo. La praktikaj ŝamanoj troviĝas en la ĉirkaŭpolusa zono de la terglobo, tiu vasta teritorio ampleksanta nordan Azion, Siberion kaj nordan Nordamerikon. La etnografia literaturo priskribas ŝamanismajn kompleksojn ankaŭ en la kulturoj de meksikaj kaj sudamerikaj indianoj, ĉe multaj triboj en Afriko, kaj en pli foraj lokoj kiel Koreio kaj Aŭstralio. Plej ofte temas pri popoloj vivantaj sur la primitiva ekonomia bazo de ĉasado kaj kolektado de vegetalaj nutraroj. Pro tio, estas tre probable, ke ŝamanoj agadis en la socioj de ŝtonepokaj homoj antaŭ pluraj jardekmiloj. Malgraŭ daŭra modifado de indiĝenaj kulturoj pro kontaktoj kaj konfliktoj kun modernaj industriigitaj socioj kaj ankaŭ pro subpremado fare de antagonismaj registaroj kaj eklezioj, ŝamanoj agadas aktuale ĉe pluraj popoloj. Tio atestas, ke ili havas signifoplenan kaj valoran funkcion en socioj, kiuj konservas siajn antikvajn tradiciojn.



Krom la internaj fizikaj kaj mensaj kaŭzoj instigantaj homon — viron aŭ virinon — al la alvokiĝo de ŝamanismo, efikas sur la sensojn ankaŭ severaj ĉirkaŭmediaj kondiĉoj, kiel la klimato kaj ekologiaj perturboj. Tio klarigas, kial ŝamanisma konduto estas ofta ĉe popoloj loĝantaj en la fridaj, borealaj regionoj. Ĉirkaŭmedia senigado je normala sensado ne estas la sola kaŭzo de streso sentata de tuta socio. Etnografoj trovas ekzemplojn de kultura streso rezultanta de alveno de fremdaj popoloj, kiuj kreas organizitan kaj timigan konkurencon por aliro al la haveblaj naturaj resursoj* en la regiono. La ideologia reago al tiu stres-situacio montriĝas en la estiĝo de "krizo-kulto" en la indiĝena socio, kaj la ŝamano havas la taskon defendi la psikan integrecon de la komunumo. Lia sukceso dependas de la certeco, kiun havas la membroj, ke unu el ili estas kapabla helpi venki krizajn cirkonstancojn kreitajn ne nur de malamikaj loĝantoj de la reala mondo sed ankaŭ tiuj de la nevideblaj mondoj. Estas konsolo scii, ke estas en la komunumo persono, kiu povas "vidi", kio estas kaŝita kaj nevidebla de la aliaj, kaj reporti senperajn kaj fidindajn informojn de supernaturaj mondoj. Per siaj preĝoj kaj oferdonoj al dioj kaj supernaturaj estaĵoj, ŝamanoj defendas la vivon, sanon kaj fekundecon (la mondon de "lumo") kontraŭ malsanoj, sterileco, katastrofoj kaj la fortoj de malbono (la mondo de "mallumo").

Ŝamanoj devas posedi akran inteligentecon, perfekte flekseblan korpon, senliman energion kaj ankaŭ profundan scion pri la propra kulturo. Kiel kantistoj, poetoj, muzikistoj, divenistoj kaj kuracistoj ili estas gardantoj de religiaj kaj popolaj tradicioj kaj la ĉefaj konservantoj de legendoj plurajn jarcentojn aĝaj. Ili konas la proprecojn

de animaloj kaj vegetaĵoj kaj utiligas ilin por tradicia kuracado per indiĝenaj teknikoj. Grava aspekto de la kuracmetodo de ŝamanoj estas resanigado ankaŭ per spiritaĵoj kaj rimedoj.

La ŝamana seanco estas domtipo karakteriza de la regiono. Ĝi devas esti taŭge aranĝita kaj provizita per la tradicia sakrala ekipaĵo por plenumado de la ceremonio. En Siberio seancoj kutime okazas en jurto, kiu povas esti la loĝejo de la ŝamano mem aŭ, kelkfoje, nove konstruita jurto. Unue, la ŝamano elektas lokon en herbokampo kaj tie konstruas sian jurton el ŝtupoj. Ĉe unu flanko de meze situanta fajrejo li starigas trunkon de juna betulo aŭ lariko, senigitan je siaj malsupraj branĉoj. Ŝtupoj estas noĉitaj en la arbo por supreniro de la ŝamano, kaj la pinto estas elŝovita tra fumtruo en la tegmento. Ĉe la alia flanko de la fajrejo estas sternita tapiŝo, kaj benkoj por spektantoj staras ĉe la muro. La arbotrunko simbolas la

La ŝamana seanco

La lokalo de ŝamana seanco estas domtipo karakteriza de la regiono. Ĝi devas esti taŭge aranĝita kaj provizita per la tradicia sakrala ekipaĵo por plenumado de la ceremonio. En Siberio seancoj kutime okazas en jurto, kiu povas esti la loĝejo de la ŝamano mem aŭ, kelkfoje, nove konstruita jurto. Unue, la ŝamano elektas lokon en herbokampo kaj tie konstruas sian jurton el ŝtupoj. Ĉe unu flanko de meze situanta fajrejo li starigas trunkon de juna betulo aŭ lariko, senigitan je siaj malsupraj branĉoj. Ŝtupoj estas noĉitaj en la arbo por supreniro de la ŝamano, kaj la pinto estas elŝovita tra fumtruo en la tegmento. Ĉe la alia flanko de la fajrejo estas sternita tapiŝo, kaj benkoj por spektantoj staras ĉe la muro. La arbotrunko simbolas la



BERNARD GOLDEN, H

KREDO

PRA

arbon, kies radikoj atingas la subteran mondon, kaj kies supra parto kondukas al la ĉielo. Ĉe nordamerikaj indianoj ŝamanoj faras sian seancon en tendo, vigvamo, terkabano aŭ ligna dometo. Pro manko de fenestroj estas mallume interne. Meze de la planko estas fajrejo, de kie fumo de la fajro supreniras rekte al la tegmenta fumtruo. Mankas mebloj, sed lanaj litkovriloj por spektantoj kuŝas sur la dure enbatita, tera planko.

Ŝamanaj vestoj

Ne povas okazi seanco, se la ŝamano surhavas nur profanan, ĉiutagan veston. Se speciala kostumo ne ekzistas, anstataŭas ĝin ĉapo, zono, tamburo aŭ klakilo kaj diversaj sorĉo-objektoj. Tre

ŜAMANISMO ESTAS RELIGIA KOMPLEKSO, KIUN LA HOMO EN PLURAJ PARTOJ DE LA MONDO DISVOLVIS POR KOMPRENI LA NEVIDEBLAJN FORTOJN DE LA NATURO KAJ DEFENDI SIN KONTRAŬ INSIDAJ MALSANOJ KAJ ĈIUJ ALIAJ NECERTAJ ASPEKTOJ DE LA VIVO. TIEL, EN TIU LARĜA KADRO, ĜI OKUPIĜAS PRI FUNDAMENTAJ HOMAJ VALOROJ KAJ DIFINAS RILATOJN INTER HOMOJ, INTER ILIAJ SOCIOJ KAJ LA NATURA ĈIRKAŬMEDIO, KAJ INTER ILIAJ KULTUROJ KAJ LA KOSMO.

Tiu ĉi ŝamano de la popolo embera-ĉokoo el la sudamerika pluvarbaro vokas la spiritojn kiel parton de kuraca ceremonio.

(Desegnaĵo de Chafil Cheucarma el NATURE & SOURCES de Unesko, volumo 30, numero 1, 1994.)



Aksesoraĵoj

Krom la riĉe garnita kostumo kun simbolaj ornamaĵoj, la ŝamano devas provizi sin per aro da specialaj rekvizitoj, por ke la seanco estu efika. La plej grava ilo servanta por alvoki spiritojn estas tamburo. Konstanta tamburado ebligas al la ŝamano kontakton kun la spirita mondo, al kiu li estas preparanta sin por vojaĝi. La tamburo de la siberia ŝamano estas ronda aŭ ovala, farita per la haŭto de rangifero, alko aŭ ĉevalo. Ĝia larĝa rando estas el larikoligno, kaj ĉirkaŭ la ekstera surfaco estas muntitaj resonatoroj. Fiksita al la malantaŭa parto de la tamburo estas vertikala ligna kaj fera mantenilo. Horizontalaj fadenoj aŭ lignaj kojnoj tenas multajn pecojn da tintanta metalo, klakilojn kaj sonorilojn. Ornamas la tamburon interne desegnaĵoj montrantaj ruĝajn cervojn, montarajn kaprojn, ĉevalojn, birdojn kaj aliajn bestojn. Troviĝas ankaŭ simbolaj desegnaĵoj de servivaj objektoj: la mond-arbo, suno, luno, ĉielarko kaj sago.

La tamburo estas grava rekvizito ankaŭ por la nordamerika ŝamano, kiu faras ĝin el rezinoza pinligno. Lia dua plej bezonata ilo estas pipo el ligno aŭ kalumeto el ruĝa kalinito*, ĉar intensa fumado karakterizas indianajn seancojn. Komerca tabako kutime ne taŭgas por ŝamanaj ceremonioj — oni preferas fumas indianan tabakon faritan el la ŝelo de la ruĝa saliko aŭ el aliaj indiĝenaj vegetaĵoj. Dum la seanco la ŝamano periode prenas pipon kun tabako kaj enspiras profunde. La fumo bongustas kaj la ŝamano sentas eŭforion. La bonodora tabakfumo plenigas la tendon aŭ domon kaj supreniras rekte al la spirit-mondo tra la fumtruo en la tegmento. Samvoje alidirekta povo fluas mal-supren al la ŝamano tra la piptubo, kaj li sentas ĝin senpere eniri lian korpon, dum li tenas la pipon. Poste li daŭrigas la kantadon.

Krom sia tamburo, pipo kaj tabako, la indiana ŝamano posedas ankaŭ jenajn aksesoraĵojn: bastonon, agloplumojn, krotal-sonorilojn, klakilojn, saketon kun rok-kristaloj, ŝtonetojn, kavajn krur-ostojn de birdoj kaj aliajn sorĉajn aĵojn. Ankoraŭ unu grava ilo por la ŝamana kurac-ceremonio estas suĉtubo el eburo aŭ antler*^o, kiu servas kiel anim-kaptilo. Tiuj sakralaj objektoj estas traktataj kun granda respekto, kaj la sako aŭ korbo enhavanta ilin estas gardata en sekreta loko.

KAJ

KTIKOJ

La riĉega kaj signifoplena vestaĵo plus la gravega tamburo donas indan kadron al la seanco de tiu ĉi siberia ŝamano.

Maldekstre paĝomeze, ilustraĵo de la 18-a jarcento montras siberian ŝamanon.

UNGARIO

Ekstazo kaj tranco

Praktikado de la kompleksa fenomeno de ŝamanismo povas okazi, kiam la ŝamano ekstaziĝas, t.e. travivas altan gradon de ekscitiĝo kun intenseco de sentoj kaj subiganta emocio preter memregado kaj rezonado. En arktaj regionoj tiuspeca ekzaltiĝo estas konsiderata la maksimuma religia esprimmaniero. La celo de ekstazo estas ebligi trancon.

Ŝamanoj scias la misteron de la trarompo de la supernaturaj ebenaĵoj kaj vojaĝas per siaj pensoj malgraŭ enormaj distancoj kaj grandaj fizikaj baroj. Estas emfazende, ke ŝamano en la stato de tranco ne estas persono ekposedata de iu spirito. Li regas spiritojn en la sama senco, ke li, kiel homa estulo, povas komunikiĝi kun mortintaj "demonoj" kaj "naturaj spiritoj", sen tiel fariĝi ilia ilo aŭ rimedo. En la ĉirkaŭpolusa medio, kie la sensa vivo estas ĉe malalta nivelo, ekstazo estas spontana fenomeno, kaj la ceremonio finiĝas per reala katelepsia tranco, dum kiu la animo de la ŝamano vagadas en la ĉielo aŭ submondo. En sub-arktaj regionoj, kie la ŝamano ne plu estas viktimo de kosma subpremado, li ne meminiciate atingas veran trancon. Se dum la seanco fumado, kantado,

kaj dancado ne sufiĉas por atingi ekstazon kaj trancon, la ŝamano estas devigata estiĝi duontrancon per mimado de la vojaĝo de la animo en drameca formo, kiam li dancas ĝis la punkto de fizika elĉerpiĝo. Li povas ekstaziĝi ankaŭ helpe de narkotaĵoj. Haveblaj al siberiaj ŝamanoj estas diversaj specoj de halucinogenaj* fungoj, dum nordamerikaj ŝamanoj plej ofte uzas pejotlon*.

“La ŝamano povas trovi vojaĝ-celojn en eksterteraj regionoj, ĉar li havas viziojn kaj kapablas vidi kaj scii tion, kion ordinaraj homojn ne...”

La spirit-flugo

Ŝamanaj vojaĝoj al la supernaturaj mondoj okazas per flugado dum tranco. La kosmologiaj ebenaĵoj, tra kiuj pasas la ŝamano — la tero, la ĉielo kaj la submondo — estas kunligitaj per centra akso aŭ la monda kolono. La ŝamano povas trovi vojaĝ-celojn en eksterteraj regionoj, ĉar li havas viziojn kaj kapablas vidi kaj scii tion, kion ordinaraj homojn ne havas eblajn percepti per siaj kvin sensoj. La tamburado, danco kaj pitĉo de la kantado transportas la spiriton de la ekstaziulo al tiuj foraj regionoj. Kvankam la ŝamano konas la kosman geografion same kiel la teran geografion, la danĝero perdi la vojon en tiuj malpermesitaj teritorioj estas granda. Tamen, la ŝamano ĉiam povas kalkuli je siaj protektantaj spiritoj, do li ne timas riski vojaĝon en mistika ĉirkaŭaĵo.

Helpantaj spiritoj prenas multajn formojn. Ili povas esti la spiritaj fortoj loĝantaj en sakralaj lokoj aŭ ĉielaj astroj kiel stel-spiritoj kaj la lun-spirito.

Estas ankaŭ spiritoj de bestoj, de forpasintaj parencoj kaj mitaj estuloj. La celo de kontakto kun spiritaj amikoj de aliaj mondoj estas peti helpon. Dum la seanco la spiritoj parolas

Ŝamano de nordamerika tribo trasiras la ponton inter la submondo kaj la tero.

6

La fizikaj manifestiĝoj de la tranco-stato similas al epilepsoidaj atakoj. Sonoj, kiuj antaŭas trancon estas siblado, zumado kaj sonorado en la oreloj. La korpo skuĝas konvulsie, ŝaŭmo venas el la buŝo kaj sango el la naztruoj. Kelkfoje abdomenaj doloroj akompanas ekstaziĝon. La ŝamano ne plu estas sensiva je la ekstera medio. Post la klimakso de la tranco, la ŝamano kolapsas kaj kuŝas senmove, muta, en vera katelepsia stato karakterizata per interrompo de vivfunkcioj de la korpo, muskola rigideco kaj perdo de kontakto kun la ĉirkaŭaĵo. Poste li konsciiĝas per si mem. Ĉar tranco estas traŭmata travivaĵo, povas sekvi ĝin amnezio, kaj la ŝamano ne memoras la kantojn, kiujn li improvizis. Se ne okazas tiel, li povas rakonti al la ĉeestantoj pri la flugo de sia animo.




Desegnaĵo de la magia flugo de ŝamano fare de la eskima artisto Jessie Oonark.

tra la voĉo de la ŝamano. Kelkfoje la ŝamano en sia spirita formo rajdas sur la spirito de besta helpanto kiel la ĉevalo aŭ rangifero. Aliokaze li transformiĝas en spiriton de besta helpanto, precipe birdo. Inter tiuj birdoj la aglo estas la plej grava.

La simboliko de la ŝamana spirit-flugo estas tre riĉa kaj emfazas moviĝon tra la spaco kun granda rapideco. Estas necese eniri en la ĉielon en palpebruma daŭro, ĉar la magia pordego malfermiĝas kaj fermiĝas tre rapide. La plej ofta best-tipo en la simboliko de la spirit-flugo estas la birdo. Kostumoj estas ornamitaj per plumoj, surkudritaj flugiloj kaj bird-skeleto farita el fero aŭ brodita teksaĵo. Ne-vivaj objektoj asociitaj kun la spirit-flugo estas ĉasiloj kiel sagoj kaj harpunoj, kaj la ĉielarko, kiu funkcias simbole kiel ponto inter la mondoj. □

KONTAKTO Jarkolekto 1995

Se vi ne ricevis nian revuon pasintjare, vi povas ankoraŭ aĉeti unuopajn numerojn!




145 (1995:1)

La alia flanko de artefarita fekundigo. Naciaj renaskiĝoj, aparte pri Mez-Azio. Stangoj de la krokodila familio. Mistera Tiaŭanako. Unua "babilaĵo" el serio de 3: *Meztulepramismo*.




146 (1995:2)

Polemikeca *Monstroj* ĉirkaŭas vin pri rifuĝintoj en Eŭropo. Facilingva ĉefartikolo! La lingvo de surduloj kaj Gestuno kiel internacia gestolingvo. 100-a datreveno de Andreo Cseh.



147 (1995:3)

Okaze de la 50-jariĝo de UN Ralph Harry, eksambasadoro de Aŭstralio en UN, rakontas tra sia vivosperto la historion de la plej supera tera organizaĵo. Nemaĥavebla numero!




148 (1995:4)

La brazila "bovamuzego". Vojaĝo tra Interna Mongolio. Aidoso: kial morti antaŭ uzi preventilojn? La utiloj de tabako. Toleremo: ĝis kiuj limoj? La nova generacio de Disney-filmoj.



149 (1995:5)

Ovodemetania homaro. Mirinda superrigardo al la 100 jaroj de kino. Kristnaskaj kutimoj en malnova Rusio. Krimejoj de pseŭdo-framasonismo en niĝeriaj lernejoj. *La ĝisostulo*.



150 (1995:6)

Formulo ebligas felicon. La 100 jaroj de radio. La postkultisaĵojn de la videokurso *Mazi* montras ties registoro. La lasta rusa cara familio. El *Taglibro de Anne Frank*, je 50 jaroj de la milflino.

Unuopa n-ro kostas 4 gld. Se vi mendas la tutan kolekton (6 n-roj), vi pagas nur 18 gld. Se minimume 3 kompletojn, vi ricevas rabaton de 1/3 kaj sekve pagas nur po 12 gld.!

La prezoj inkluzivas sendokostojn. Por EU-landoj aldoniĝas 6% por imposto. Menu ĉe UEA.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO! fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- *Kontakto*;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

antleroj: solida decidua korno de animaloj apartenantaj al la familio cervedoj; branĉokorno de cervo, alko, rangifero ks


halucinogeno: psikofarmako; substanco kaŭzanta psikologiajn efikojn normale asociitajn kun sonĝoj, skizofrenio aŭ religia ekzaltigo; ĝi okazigas ŝanĝojn en perceptado, pensado kaj sentado

katlinito: ruĝa pipŝtono; mineralo uzata de nordamerikaj indianoj por fari kalumetojn; kiam ĝi estas elfosita el la tero, ĝi estas tre mola, sed iom post iom ĝi hardiĝas en la aero

pejotlo: du specioj de la kaktogenro *Lophophora*, familio *Cactaceae*, indiĝenaj en Nordameriko, preskaŭ ekskluzive en Meksiko; maĉado de la nematura flor-burĝono estigas *halucinogenajn* efikojn; inter ĝiaj 28 alkaloidoj, la ĉefa estas meskalino; pejotlo estas grava elemento en religiaj ritoj de nordamerikaj indianoj

resurso: natura fonto de riĉeco organika aŭ neorganika; riĉofonto; fonto de provizo

sciujo



Kial zebroj havas striojn?

Robert Roze, Francio

Zebrostrioj ne estas koketaĵo sed protektaĵo, kiu kamuflas la zebro, erarigas la malamikojn, forigas la insektojn kaj utilas kiel nefalseblaj legitimaĵoj... Unuvorte, ili estas nepre necesaj por la senzorga vivo de la afrika zebro.

Inter multnombraj teorioj oni tradicie klarigas, ke la strioj utilas kiel kamuflilo por erarigi la predanton, en la nuna kazo, la sovaĝajn bestojn. Ĉar la zebro serĉas sian nutraĵon je la ektagiĝo aŭ je la krepusko, ĝiaj nigraj strioj miksiĝas en la mallumo kaj fariĝas tute nevideblaj transe de 50 metroj. Ili plue malnetigas la konturojn de la besto kaj troigas ĝian naturan grandecon. Fakte, la strioj de la zebro celas "nebuligi" la percepton de la leono, kiu bezonas precize taksi la distancon kaj la lokon, kie ĝi mortigos sian predon.

Kie komenciĝas kaj finiĝas la zebra felo? Tio estas mistero. La strioj ankaŭ estas preciza rimedo por rekoni unu zebro inter la zebraro. Fakte la strioj malsimilas de unu individuo al la alia, kiel niaj fingrospuroj... Oni ankaŭ asertas, ke la nigra kaj blanka felo de la zebro multe pli malvarmetigas la beston ol nigra felo ĉar la varmo ne koncentriĝas kiel sur unukolora surfaco. Fakte ju pli la vetero de la lando estas varma, des pli la strioj de la zebro estas multnombraj. Finfine, ĉar la insektoj timas surflugi tiun desegnititan felon, ili ne vundetadas la zebrojn por dolorigaj pikoj.

LA REVENO DE RAMSESO LA 2-a en nia pasinta numero (KONTAKTO 152, 1996:2) estas ne FACILA sed TRE FACILA laŭ sia lingvonivelo. Ni pardonpetas!

Ekzerci ĝojon

tre
facila

— Antoine K. Kouablan, Ganao



Ekzistas mirindaj sentoj en la amikeco, inter kiuj estas la eblo trans-doni ĝojon*. Ekzemple se vizito mia havigas al amiko iom da feliĉo, la trezor*-ujo de ĝojo malfermiĝas kaj poste ni ambaŭ elkore diros: "Ha, mi havis en mi tiom da vera feliĉo, kiun mi neniam uzis!"

En ni mem troviĝas la fonto* de ĉiu vera ĝojo kaj nenio malhelpas nin uzi ĝin. Kiom ofte mi vidas homojn malgajaj kiel sen-hejmaj birdetoj. Ili ne scias al kiu direkti siajn pensojn kaj ideojn, kien adresi sian vivo-vojon; en ili vivadas granda malfeliĉego. Sed alia malgaja fakto estas

la ĝojo de solulo. Ĉu ne, ke solulo, kiu estas ĝoja, povas forgesi, ke li estas ĝoja? Al tiu ĉi solulo okazas ia mal-saĝiĝo* kaj "mal-mol*-iĝo", ĉar tiom da sento ene de homo ja bezonas eksterajn movojn. Se iu diktatoro* malliberigus min, ĉar li opinias, ke tiel li lernigos al mi timi lian povon, mi simple ekhavis kiel sanigan ekzercadon* ridi — jes, ridi sola ĉiutage, ĉar tiel mi pli-fortigos mian ĝojon, same kiel per pied-irado mi ekzercas miajn piedojn.

Oni povas vidi la ĝojon kiel aron da branĉoj*, kiuj kuŝas sur la tero: Ili ŝajnas senvivaj, kiel la tero mem — kaj se oni lasas ilin tie, kun la paso de la tempo, ili ja fariĝos tero. Tamen, ili enkaŝas forton, kiun ili prenis de la suno, kaj eĉ fajr*-ero povas bruligi* ilin.

Kelkaj simpluloj publike diras, ke por povi ami iun, oni devas forgesi pri si mem. Tio ne estas vera, ĉar se oni forgesas pri si mem, oni fariĝas solulo. Do estas bone ami aliulon sed samtempe ami sin mem — tiel oni sentas sin viva kaj neniam pretos for-lasi siajn trezorojn (amon, ĝojon kaj amikecon).

Karaj geomikoj: Amu vin, unu la alian, kaj ke en viaj koroj estu paco kaj senfina ĝojo. □

branĉo: la brako de arbo

bruligi: fari, ke io malaperu pro fajro

diktatoro: ekster-ordinara estro de ŝtato, kun la tuta povo

ekzercado: tenado de io en bona

stato per ripetado

fajro: sun-aĵo

fonto: loko, kie akvo eliĝas el la tero

ĝojo: sento de viva plezuro en la koro

mola: facile ali-form-ebla

saĝo: povo je bona pensado kaj agado

trezoro: grandega aro da multekostaĵoj, kiujn oni kaŝis ie

kontaktisto

Irina Aleksejeva

estas sendube la plej fruktodona kontribuanto de *KONTAKTO*. Ŝiaj artikoloj estas klaraj, koncizaj kaj tre variaj — ĉiam pri ŝia lando, Rusio, aŭ kun ia rilato al ĝi.

Diplomiĝinte pri psikologio kaj biologio en 1994, tiu ĉi vigla kontaktistino debutis en numero 142 (1994:4) de *KONTAKTO* kaj de tiam neniam aperis eĉ unu sola numero de nia gazeto sen iu kunlaboraĵo ŝia.

Irina estas vegetarano kaj ne fumas — io malofita en Rusio. Ŝi laboras ĉe la moskva polico kiel porinfana psikologo. En tiu ĉi foto ŝi provas analizi sia hundon Sting.



KRUCVORTA KONKURSO

— REZULTO

- La konkurson de *KONTAKTO* 151 (1996:1) partoprenis entute 15 homoj el jenaj landoj:
 - Bjelorusio, Francio, Hispanio,
 - Hungario, Italio, Nederlando,
 - Rumanio kaj Rusio. Lotume venkis **Monique Noel** el Francio. Gratulon al ŝi!

Ĝ	I	S	O	S	T	U	L	O
E	S	O	T	E	R	■	E	R
N	U	L	■	■	■	■	K	O
T	■	D	U	O	D	E	N	O
I	R	A	S	■	I	L	A	D
L	A	T	E	R	A	N	■	O
E	M	O	■	■	■	E	S	K
G	O	■	K	U	I	R	A	S
A	N	T	I	K	V	E	G	A


Krucv

Sendu vian solvon al nia redakcio antaŭ la **31-a de oktobro 1996**. Inter la partoprenintoj ni lotumos **KANAKO EL KANANAM** (aventuroj en la ĝangalo de Novgvineo), originale verkita en Esperanto kaj lukse bindita. **Rapidu pri via solvo!**

La ruza fianĉo


— K. Mayinda, Zairio

facila



Malica* homo foje vivis en vilaĝo, kie li suferigis la aliajn. Lia filino estis fianĉino* de serioza junulo, kiu jam pagis multe kiel doton* sed la patro ankoraŭ ne estis kontenta. Li venigis la junulon kaj diris:

"Mi volas doni al vi laboron; tio ne vere estas laboro sed ekzameno. Se vi sukcesos, vi ricevos vian edzinon.



Horizontale

3. Dika, "malpura" besto; 4. Grandvalora metalo; 5. Arĉa muzik-instrumento; 9. Kuko; 10. Oficiala skriba konstato; 15. Tropika arbo dik-trunka, kies portreton vi vidas ĉi-fote; 16. trunkaro sur rivero; 19. Kontraŭo; 22. Sezono; 24. Malgranda kaverno; 26. Kvalito perceptata per flaro; 28. Monato

Vertikale

1. Stristo; 2. Artisto; 6. Antaŭsento; 7. Insektido; 8. Gaso; 11. Rusa mono; 12. Reĝa seĝo; 13. Vira infano; 14. Afrika feliso; 17. Vitro por pligrandigo; 18. Trairo de aero en la korpo; 20. Grandiozo, lukso, parado; 21. Ĥemia elemento, metalo; 23. Meblo; 25. Trinkaĵo; 27. Superhoma estaĵo

Mi sendos vin serĉi du objektojn. Por alporti ilin al mi, vi devos labori dum longa tempo."

La junulo respondis: "Diru al mi la du objektojn, kiujn mi devas al vi alporti kaj mi ricevos mian edzinon".

La maljunulo diris, ke li ek-serĉu ha! kaj hi!, kaj li havos sian fianĉinon.

La malriĉa junulo sin demandis, kio estas ha! kaj hi! Li petis konsilon de ĉiuj plaĝuloj, sed neniu povis lin helpi. Li ekhavis ideon: li iris en la

arbaron, prenis grandan araneon* kaj enfermis ĝin en kukurbon*. Li ankaŭ serĉis ejon de ruĝaj formikoj* kaj tion enfermis en alian kukurbon.

Li sin prezentis al la maljunulo kaj diris "Metu vian fingron en tiun ĉi

malica: vole malbonfarema, malfeliĉigema
fianĉino: virino, kiu akceptis la edziĝ-promeson de viro


doto: havaĵo, kiun edzo havigas per la edziĝo al sia edzino aŭ ties gepatroj

kukurbon". La maljunulo metis sian fingron kaj pro la fortega piko de la araneo li kriis "ha!"

"Vi havas vian ha!", diris la junulo. "Nun metu la fingron en tiun ĉi alian kukurbo kaj vi havos vian hi!" Sed

araneo: besto, kiu lerte faras tre maldikajn fadenojn, per kiuj ĝi kaptas insektojn
kukurbo: ofte granda legom-frukto
formikoj: "laborema" insekto
ruza: kapabla elpensi lertajn rimedojn

la maljunulo sentis doloron kaj ne plu volis plian provon. Li donis sian filinon al la ruza* fianĉo. □



anonc tabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

10-jaraj infanoj deziras korespondi: Arley Abreu Fernández, calle 24 e/ 17 y 19 # 1710, CU-42700 Pedro Betancourt, Matanzas, Kubo.

24-jara komercantino deziras korespondi tutmonde: Rúbia Maria Vasconcelos da Silva, Rua Santa Tereza 310 (Centro), BR-53400 Cidade Paulista - PE, Brazilo.

Deziras korespondi pri naturalismo, turismo, popolaj artoj, estetiko, fotado kaj poemoj Carlos Raimundo Nunes do Rêgo, Rua Antonia G. Silveira 1436 (Cristo Redentor), BR-58071-200 João Pessoa - PB, Brazilo.

Poŝtmarkojn aŭ/kaj -kartojn pri PAPILIO(J) bv. sendi al mi: Japana Esperanto-domo (vd. *ESPERANTO* nov. '94 p. 181) iom post iom enradikiĝas en la urbeton Nagasaka-ĉo kun papilia simbolo. Al la urbetanoj mi demonstru la praktikecon de Esperanto per tiu ĉi kolekto el la tuta mondo, pere de Esperanto. Mi atendas vian bonkoran helpon kun antaŭdanko. Micukaŭa Sumiko, 33 Kamihom-maĉi, Ŝiĉiku Kita-ku Kioto 603, Japanio.

La ĵus naskita Tana Esperanto-Klubo (TEK) deziras ĝemeliĝi kun alilandaj E-klubo kaj korespondigi siajn lernantojn. Bonvolu kuraĝigi nian agadon per salutoj! TEK, s/c s-ino Ralalarisoa Justine, logt 07 Cité Mandroseza, MG-101-Antananarivo, Madagaskaro.

Kvar studentinoj deziras korespondi tutmonde en Esperanto aŭ la angla.

- 19-jara Mojgan Karimy, No 2331, 2-nd Floor, Block N-22, Panj Tabagheha, Sh. Nojeh Paygah, Hamedan, Irano.
- 20-jara Zahra Rangchi, No 25, Farhang Str., IR-65159 Hamedan, Irano.
- 21-jara komercantino, Arezu Golpaygani, No 13/62, Zed Str. Imam Reza 34, IR-91738 Meshed, Irano.
- 22-jara Mahbubeh Sanayi, No 5202, Sh. Mirzayi Str. Arak Ave., IR-65716 Malayer, Irano.

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



Ĉiu-tage pli kaj pli malmultiĝas la vere naturaj lokoj sur la Tero. La natura montrindaĵo de iu lando de nokto al tago povas aliformiĝi en kloakon*. Feliĉe tiu ne estas la kazo de la loko, kiun mi volus prezenti kiel la koron de Siberio. Fakte, multaj homoj devis "militi" por ke ĝi restu pura kaj ke tiel oni konservu ĝin ankoraŭ jardekojn. Mi parolas pri Bajkalo.

Ver-ŝajne ĉiu, kiu iom scias pri la konsisto de Siberio tuj diros, ke Bajkalo estas la plej granda lago de Rusio kaj... tie ĉiuj scioj finiĝas. Nu, kion signifas Bajkalo por rusoj?

Pri la lago oni skribis sen-nombrajn artikolojn kaj multajn librojn; oni pentris ĝin ofte kaj eĉ kreis muzikaĵojn. Ĝis hodiaŭ ni kantas "... Glora* maro, sankta Bajkalo..." Jam jardekojn Bajkalo estas plej alt-ira loko por turistoj, kvankam ekzistas aliaj ne malpli belaj lagoj.

Ekvidi Bajkalon unuafoje ofte sen-iluziigas* homojn, sed kiam oni dum kelkaj tagoj ree kaj ree renkontas la lagon kaj la naturon ĉirkaŭ ĝi, oni komencas kompreni la belecon de Bajkalo. Ĉar cetere, la beleco de la lago estas aparta, ne tia kiel kutime ĉe maroj aŭ lagetoj. Ĝia ĉirkaŭaĵo kaptas per sin-retena kaj nobla* simpleco. Ĝiaj koloroj estas tre puraj kaj fortaj samtempe. Ĉielo kaj akvo tie estas tiel bluaj, kiel kutime oni pentras ilin en por-infanaj desegnaĵoj.

Trankvila sed miriga dancado estas grava eco de Bajkalo. Nur kiam ŝtormo* malleviĝas sur la lago, Bajkalo iĝas terura. Sed eĉ je muĝado* de ŝtormo kaj bruego de ondo*-frapado Bajkalo ne montras veran koleron. Ĝi vidigas nur aĉan ŝercemon, same kiel farus ludema knabego.

Ĉirkaŭ Bajkalo sidas lokoj tute ne kutimaj por Siberio: flav-ruĝaj stepoj* for-brul-igitaj de la suno; "malgranda maro" barata de insuleto Oljĥon disde la granda Bajkalo; sukcenaj* sabloj* de mond-fama Sabla Golfo*. Ankaŭ apud Bajkalo jam pli ol 70 jarojn ekzistas plej malnova Barguzinskij, la unua nacia parko de Siberio. Tie hejmas la sen-egala nigra barguzinskij-zibelo*. Tiu ĉi nacia parko, komenciĝanta de la bajkala bordo, konsistas el vera arbo-mar. Entute tie kreskas 765 specoj de plantoj. Plej valora oni opinias la siberian pinon*.

Bajkalo, koro de Siberio


facila

— Irina Aleksejeva, Rusio

Kio pli gravas por homo ol libereco, sano, bonaj inter-rilatoj kaj pura naturo ĉirkaŭ li?

Jen plej natura portreto de la nigra barguzinskij-zibelo.*





Bajkalo en la mondo



Aŭtuna Bajkalo


La bestaro ja restas propra de Siberio. Oni povas ofte renkonti tie ursojn* (iama simbolo* de nia lando) kaj ankaŭ — malpli ofte — lupojn*, linkojn* kaj vulpojn*.

La riveroj de la nacia parko maldormas nur kvar aŭ kvin monatojn jare. Tre valoraj kaj famaj specoj de salmo*-fiŝo vivas en Bajkalo kaj la apudaj riveroj.

Nun mi volus al-doni kelkajn interesajn informojn pri la “kara lago”: La areo* de Bajkalo estas pli-malpli egala al tiu de Belgio, Nederlando aŭ Danio — sed ĝi estas nur oka laŭ sia areo kompare kun aliaj lagegoj de nia mondo. Ne estas mirinde, do, ke Bajkalo enhavas 1/5 parton de la mondaj posedadoj de trinkebla akvo. La profundo de Bajkalo, kalkulita je 1 637 metroj, estas plej granda por la teraj lagoj.

La vorto “Bajkalo” estas turklingva kaj konsistas el du partoj, *baj* kaj *kulj*, kio signifas “riĉa lago”. Bajkalo ja pravigas sian nomon: Laŭ sciencaj esploroj, ĉiuj homoj de la mondo povus travivi preskaŭ 40 jarojn uzante nur la akvon de Bajkalo. Vere riĉa ĝi estas.

Espereble ĉiuj teranoj bone komprenas, ke sen pura naturo ni ne restos vivaj longe. Tial min tre ĝojigas la fakto, ke ĉiuj industriejoj ĉirkaŭ Bajkalo estos fermitaj. La plej bela ido de la siberia naturo restos pura por niaj posteuloj. □



Vidaĵo de la nacia parko.

areo: surtera granda
glora: posedanta *gloron* (= grandecon)
golfo: parto de maro, kiu eniras kaj larĝigas en la teron
iluzio: imagaĵo
kloako: fluejo de homaj malpuraĵoj
linko: nord-arbara kat-besto plej bone vidanta, konebla per la har-aretoj ĉe la orel-finoj
lupo: arbara kuzo de la hundo, kiu tre ŝatas timigi per “aŭŭ...!” dum plenlunaj noktoj
muĝado: la parolado de bovinoj: “Muuu...!”
nobla: havanta altajn kvalitojn de boneco
ondo: akvoamaso, kiu levigas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro, lago ks

pino: montara arbo kun formo de tri-angulo
sablo: la “tero” de la maro
salmo: fiŝo mara, foje rivera, kies bongusta viando estas rozkolora
simbolo: objekto, signo, vorto, kiu tuj el-vokas ion en ni
stepo: vasta ebenaĵo senarbara
sukceno: malmola travidebleca flavaĵo pratempa, el kiu oni faras diversan objektojn
ŝtormo: ventego kun timiga pluvego aŭ neĝado
vulpo: kuzo de la hundo, kun belega vosto
urso: granda besto, kiu dormas la tutan vintron
zibelo: nord-azia besto kun grandaj oreloj kaj valora hararo

Patro de Solaris

facila

— Claus Günkel, Germanio

KONTAKTO salutas Stanisław Lem, verkinto interalie de la famega Solaris, okaze de lia 75-a datreveno.

Stanisław Lem [stanisŭav lem] naskiĝis la 12-an de septembro 1921 en Lvovo, urbo, kiu nun apartenas al la ŝtato Ukrainio. Li estas polo. Dum la granda milito de 1939 ĝis 1945, la tiel nomata Dua Mond-milito, li laboris kiel aŭto-mekanikisto* kaj helpis al sia lando Pollando ĝis ĝia liberiĝo. Post tiu milito, Lem studis medicinon* en la pola urbo Krakovo, ĝuste la urbo, kie okazis la Internacia Junulara Kongreso en 1987. Tie li ankoraŭ hodiaŭ loĝas. Sukcesinte ĉe ekzameno li iĝis asistanto* pri problemoj de psikologio*, sed hejme li okupiĝis pri problemoj de matematiko* kaj similaj sciencoj. Krome li tradukis sciencajn tekstojn.

En la jaro 1973, Stanisław Lem ricevis la Grandan Ŝtatan Premion de Pollando pri Literaturo, ĉar li intertempe jam skribis famajn verkojn, i.a. *Solaris*.


Solaris estas planedo*, kie kuŝas granda maro. Tiun planedon vizitas homoj de nia Tero. Ili ne scias, ke tiu maro vivas, ĝi estas vivaĵo kiel ni homoj. La maro estas inteligenta vivaĵo, sed kun alia formo: ne homa, sed do mara. La romano *Solaris* priskribas la problemojn de la Ter-anoj sur tiu planedo: la inteligenta maro povas legi la pensojn de la homoj kaj faras, ke la homoj kredu, ke iliaj pensoj estas la vero.

Lem jam verkis multe. Aparte interesaj estas liaj fabeloj* pri robotoj*. Ĉiuj aŭdis fabelojn: ili rakontas plej ofte pri reĝidoj kaj reĝidinoj, pri bonuloj kaj malbonuloj. Ankaŭ Lem rakontas fabelojn, sed ili ne okazas sur nia Tero nek pri homoj. Liaj robotaj fabeloj dis-volv-iĝas sur aliaj planedoj ĉe malproksimaj steloj, kaj la agantoj estas ne homoj sed robotoj. Oni povas legi pri robotaj reĝidoj kaj reĝidinoj aŭ pri robota reĝo, kiu volas scii ĉion, kion la robotoj en lia reĝolando pensas pri li.

Por la robotoj en la fabeloj de Lem, la normala eco estas la malmoleco. Tio estas tute komprenebla, ĉar robotoj estas el metalo — kaj metalo estas malmola. La robotoj do opinias nin homoj tre aĉaj kaj malbelaj, ĉar ni estas molaj, kun haŭto kaj sango. Ili eĉ pensas, ke inteligenteco povas ekzisti nur en malmola metalo kun elektraj metal-fadenoj. Se vi volas legi tian robotan fabeloj de Stanisław Lem, legu la apudan tekston *La enigmo*.

Famaj estas ankaŭ liaj romanoj sub la nomo *La stelaj taglibroj*. Temas pri taglibroj de rimarkinda astronauto*, kiu vojaĝas inter la steloj kaj planedoj. Unu el tiuj rakontoj pri astronauto troviĝas en la unua numero de la Esperanta libro-serio Sferoj: *La rememoroj de Ijon Tichy*. Stanisław Lem mem fondis Polan Astronaŭtan Asocion kaj daŭre loĝas en Pollando, kie ekde januaro 1973 li laboras universitate en Krakovo pri pola literaturo.

Kaj nun multan ĝojon dum la legado de *La enigmo*, kiu bedaŭrinde ne estas en facila lingvo, sed eble kun la helpo de vortaro vi povas ellegi. □



12

n-ro 153 (1996-3)

KONTAKTO

Se vi interesiĝas pri scienc-rakontoj, en Esperanto ili ne mankas. Nepras legi almenaŭ *Misio sen alveno* de John Francis (21 gld.) kaj *La stratoj de Aŝkelono* de Harry Harrison (4,80 gld.). Ekzistas eĉ 3 serioj pri la temo: *Sferoj* (9 rakontaroj eldonitaj ĝis nun — eblas aĉeti numerojn 4, 6, 7, 8 kaj 9 je 19 gld. kaj n-ron 5 je 19,50), *Orboto nula* (aperis unu libro, kiu kostas 12 gld.) kaj *Future* (ankaŭ kun unu libro—9 gld.) Mendu ĉe UEA!

asisti: pro ofica devo, ĉe-esti por helpi al iu
astronauto: homo, kiu veturas ekster nia Tero inter la planedoj
enigmo: malklara, malfacile komprenebla afero aŭ demando
fabelo: rakonto, precipe por geknaboj, pri el-pensitaj okazaĵoj de kuraĝuloj kun super-naturaj kapabloj
matematiko: scienco pri nombroj, kvantoj, formoj kaj aranĝoj
medicino: scienco pri sano kaj malsanoj kaj arto ilin kuraci
mekanikisto: aparatisto, maŝinisto, il-isto
planedo: korpore en la ĉielo, kiu mem ne lumas kaj iras ronde ĉirkaŭ suno
psikologio: scienco pri-skribi kaj ekzameni la personecon de homo
roboto: hom-aspekta maŝino, kapabla obei certajn ordonojn kaj fari malsimplajn taskojn

Pastro Zinkano, ankaŭ nomata Doktoro Magnetisma, sidis en sia ĉelo kaj studis knarante (pro humileco li ne lubrikis siajn artikojn) la komenton de Klorofanto Ĉioekscito, kies sesan ĉapitron *Pri la kreado de l' robotoj* li precipe konsideris.

Li ĵus ellegis la strofojn pri la kosma programado, kaj lia atenta rigardo iris sur la folioj dekoritaj de buntaj komenc-literoj. Ili malkaŝis, kiel Sinjoro blouetis la spiriton en la feron, ĉar tiu metalo estis Lia plej ŝatata el ĉiuj.

Tiumomente pastro Kloriano mallaŭte eniris la ĉelon kaj modeste restis staranta ĉe la fenestro por ne ĝeni la eminentan diiston meditantan. "Kio estas, kara Kioĉjo? Kion vi volas diri?" demandis pastro Zinkano post mallonga momento, kaj la klaraj kristaloj de liaj okuloj forrigardis de la librego.

La demandito respondis: "Majstro kaj Pastro, al vi mi portas tiun ĉi libron, ĵus damnitn de Sankta Ofico, naskitan el Satanaj flustrajoj, skribitan de la fia Marmagedono Ŝtanduro nomata la Halogena, kun la priskriboj de liaj malĉastaj eksperimentoj, per kiuj li klopodas nuligi la ĝustan kredon." Dirante tion ĉi, li kuŝigis maldikan libreton jam adekvate sigelitan de Sankta Ofico.

La enigmo

La maljunulo frotis sian frunton, kaj lomete da rusto falis sur la foliojn de la libreto, kiun li uigie prenis kun la vortoj "Nenio fia, ja nenio fia, kara Kioĉjo, sed io fatala, fatala pro siaj konfuzoj!"

Li foliumis la libreton kaj ridetis apenaŭ rimarkeble sed tamen tute bonanime kaj legis la diversajn titolojn, jen *Pri la palaj malduruloj*, *malduranoj kaj plimalduruloj* jen *Pri la pensanta kazeo* jen *Pri la genezo de l' racio el la neracia maŝino* kaj diris: "Uu, kara Kioĉjo, kaj tuta

Sankta Ofico, kiun mi supermezure adoras, vi ja ne traktas la aferon ĝuste. Nu, kio do estas vere skribita ĉi tie? Sensencaĵo de iu misŝaltita bito, stultajo, falsaj legendoj reviviigitaj je la kioma ajn fojo – kaj ĉio komenciĝas per tiuj malduridoj aŭ maldurajanoj aŭ palaj malsekuloj aŭ, kiel aliaj apokrifoj rakontas, gelatenuloj, kiuj laŭdire kreis nin pratempe el drato kaj ŝraŭboj...”

“Anstataŭ la Plej Alta!!!”, pastro Kloriano iom treme sibilis. Pastro Zinkano tute nature daŭrigis siajn ideojn: “Ade damnante ĉiudirekte oni ne multe atingas. Ĉu ne estas pli saĝa la opinio de pastro Eterano de la Fazotronoj, kiu diris antaŭ tri jardekoj, ke tio ne estas di-scienca sed natur-scienca problemoj?”

“Ho, pastro Zinkano!” – pastro Kloriano preskaŭ ne povis pluparoli. “Tiu doktrino ne rajtas esti instruata de katedre. Nur pro la sankteco de l’ verkinto ni ne malbenis ĝin.”

“Trankviliĝu, kara Kloĉjo. Estas tre bone, ke ĝi ne estis malbenita, ĉar ĝi ne ŝajnas esti maltrafa. Eterano diris, ke ne estas kontraŭ la supernatura komenciĝo de ĉiu vivo, se vere estis iam iuj tiaj maldurajidoj, kiuj kreis nin en siaj laborejoj kaj kiuj poste ekstermis sin mem. Per la volo de ĉiopova Sinjoro, tiuj primitivaj

tuta gelatenologio de l’ maldurologo Turmalino, sur kiu la teorioj de pastro Eterano baziĝas. En tiu libro ja estas skribite, ke la gelatenuloj ne produktis sian idaron laŭ projektotipoj helpe de generaj inĝenieroj laŭ la nura natura maniero, do la muntado el antaŭ-fabrikoj, sed sen iuj ajn instruoj aŭ dokumentado, preterpase, kaŝe kaj preskaŭ tute senpripense. Sed kiel eblas neprojektita ido? Ido kontraŭplana, ni diru ne aprobita de la ĝusta instanco en la demografi-industria sekcio; tion mi ja iel komprenas, sed ĉu sen iuj ajn dokumentado? Kiaj estis iliaj ĝeneriloj?”


“Mi konsentas, ke tio estas stranga. Sed kie troviĝas la blasfemo?”

“Pardonu, atestimata pastro, nun estas mi, kiu miras, ke vi ne rimarkas tion. Tamen, se ili senprokraste, abrupte, prompte povus fari ion, kio necesigas ĉe ni finitan altlernejan studadon, kontrolan komisionon kaj kalkulajn ekspertizon, tiukaze ĉiu el ili havus en la fingreto generan kapablon, kiu egalas al la scio de niaj cibernetikistoj, doktoroj, ja eĉ al lasitaj docentoj informadikaj. Ĉu eblas tio? Sed kiel ĉiu simplulo povis havigi idon sen pripensi? De kiu ili scias, kiel fari? Ĉu la alternativo al diplomo do estas krei la idaron sen iuj ajn scio, per unu nura movo

konservitaj sur bruidifektitaj folioj en libro-kolektejoj, jen karesulo kaj karesino (certe tio ĉi ĝuste tekstas kazeulo kaj kazeino), sekve ĉiam duopo formis komunon por multoblīgi. Ĉu vi komprenas? Ili serĉis solecon por konsulti unu la alian, por paroli pri la teknikaj desegnaĵoj kaj por zorgi pri la necesaj kalkuloj. Ili certe projektis, ĉar sen projekti ne eblas produkti. Tie do troviĝas interkonsento, kara Kloĉjo. Sed jes ja, ili projektis, alimaniere ne eblis. Ne estas facile fari racian vivadon, ĉu duran, ĉu malduran.”

Trem-voĉe pastro Koriano sciigis: “Mi nun diras ion, kion mi preferu ne ŝatas trovi. Viaj pensoj, honorinda pastro, prenis danĝeran vojon. Baldaŭ vi eĉ diros al mi, ke oni povas konstrui sian idaron sen projekt-tabuloj, sen provadi la prototipojn laboratorie kaj sen ekstrema koncentrado de l’ inteligentaj mensoj – sed en lito sen ĉiuj tiaj modeloj kaj studadoj, blinde, palpante kaj tute senvole... Mi petegas vin, mi avertas vin. Tio ne nur estas komplete sensecaĵo, sed insido pere de Satano. Regajnu vian konscion, pastro.”

La maljunulo obstine respondis: “Ĉu vi opinias, ke Satano tiel ege penas? Ni lasu la generaĵn misterojn trankvilaj. Prok-



gmo

Stanisław Lem

(Trad. Claus Günkel)

paluloj ja iĝis iloj de la vera kredo; al iliaj manoj Li konfidis konstrui la ŝtalan popolon, kiu tial ofertas al Li dank-riĉajn himnojn ĝis Lasta Testa. Mi opinias male, ke fian herezon odoras la alia opinio, kiu decide kontestas tian ebladon, ĉar ĝi bibliokontraŭe malkoncedas la ĉiopovecon al Li. Kion vi pensas pri tio?”

“Tamen, pastro Zinkano, doktoro Ciborakso de Sankta Teologio indikis, ke kaj pri la racio mokantajn tezojn kaj blasfemojn kontraŭ la kredo enhavas la

kaj per kelkaj puŝoj? La vortoj apenaŭ volas iri mian langon, ĉar per tio oni ja koncedas al ili la potencon krei el nenio kaj ankaŭ la kapablon fari miraklojn, kio estas nur de Sinjoro.”

Pastro Zinkano esprimis: “Vi diras, ke ili estis aŭ generivaj geniuloj aŭ miraklofarantoj. Sed la patologo Dializo skribis, ke ili produktis siajn idojn nek konsilantare nek grupe nek sole sed duope. Ĉi tie mi vidas fakan specialigon! Pri tiu afero atestas terminoj legeblaj kaj

simiĝu, mi rakontos al vi sekreton, kiu eble trankviligos vin... Hieraŭ mi ekscias, ke tri kemiistoj en Koloida Instituto faris flaŭnon el gelateno, akvo kaj alia materialo – mi pensas, ke estis fromaĝo. Ili nomis ĝin *ĝel-cerbo*, ĉar tiu flaŭno ne nur kalkulas operaciojn de l’ alta algebro, sed ankaŭ lernas ŝak-ludi kaj maligis la institutestron. Do vi vidas, ke estas uana entrepreno persisti, ke penso ne povas resti en gelateno. Sed tio ekzakte estas la neforigebla opinio de Sankta Ofico.” □

La historio estas rakontita en dikega kaj ĉarma volumo ŝuldita al la plumo de la kuba etnografo kaj erudiciulo Fernando Ortiz¹. Temas pri vera juvelo. Jen ĝi:

La afero komencigis en la jaro 1672, en la malgranda vilaĝo San Juan de los Remedios del Cayo, fondita la 3-an de majo 1514 de Vasco Porcallo de Figueroa, kiu tiam nomis ĝin Santa Cruz de la Sabana. Eble tie kuŝas la kialo de ĉio, kio poste venis. Ŝajnas, ke tiu konkerinto estis homo sufiĉe kruela kaj diabla, do sendube sukcesis havigi al si amikojn en la infero... Sed en la jaro 1672 la vilaĝeto, loĝata de nur 613 homoj (oni en-kalkulis nek indianojn nek sklavojn) estis dormema loko, kie la loĝantoj trankvile dediĉis sin al terkulturo kaj brut-bredado. Nu, bone, ili ankaŭ disponis tempon por kontra-bandado kun la piratoj kaj aliaj fiuloj, se paroli pri bagateloj, sed tio nenion signifas. Ni ĉiuj estas pekuloj... Krome, en tiuj tempoj la sinteno antaŭ malpermesoj kaj similaj reĝaj ordonoj estis "acato, pero no obedezco" ("Jes, mi agnoskas vian aŭtoritaton, sed mi simple ne obeos") kaj la moralo de la kolonianoj estis aparte elasta, do neniu tro laŭte protestis. Tamen, la insulaj aŭtoritatoj decidis proponi al la vilaĝanoj translokiĝon al loko malpli proksima al la strando. La novaĵo ne vekis entuziamon ĉe la vilaĝanoj, sed kelkaj tieaj gravuloj komencis manovri kun la celo, ke la nova loko estu parto de iliaj parceloj; kompreneble, tiukaze la vilaĝanoj estus devigitaj aĉeti la terenojn, do bonega negoco konturiĝis.

DEMONINVA

En la jaro 1682 kuba vilaĝo estis sieĝata kaj invadita de ne malpli ol 800 000 demonoj.

Ĉu neniam oni rakontis al vi pri la heroo batalo de la vilaĝanoj kontraŭ la diablaj legioj, gviditaj de Lucifero mem? Ha, vi devas aŭskulti la tutan historion! Venu, sidiĝu...

Patroj Cristóbal Bejarano kaj José González de la Cruz, posedantoj de latifundioj, konkuris inter si pro la decido, kien iri. La disputo estis tiel akra, ke oni venigis la vicinsulestron, por ke li tranĉu la Gordian nodon. Li decidis favore al Patro González kaj devigis ĉiujn iri en la terenojn de ĉilasta. Nu, li tion ordonis, sed la rezulto estis formiĝo de tri partioj: ĉiu sacerdote havis la sian, kaj la tria konsistis el tiuj, kiuj tute ne deziris moviĝi.

Post sufiĉe da disputoj kaj malbona volo (la parceloj montriĝis ne tro taŭgaj) la insulestro, tedita de la afero, nuligis la ordonon pri translokiĝo. Dek jaroj pasis...

Kaj subite, jen demonoj ĉie!

Pluraj demonaj legioj starigis pontokapon en Remedios, kaj komencis turmenti la vilaĝanojn. Aspergado, preĝado, rozarioj, medaloj, ĉio fiaskis. Nenio montriĝis efika armilo kontraŭ ne malpli ol 800 000 demonoj, gvidataj de Lucifero mem (fakto registrita antaŭ notario), kiuj mincis ankaŭ per



"La tenjoj de Sankta Antono" de Martin Schongauer (ĉ. 1480-90, Metropola Artmuzeo, Novjorko)

"Ĉu vi parolas tendare?" estis origine verkita por instrui Esperanton dum labortendaroj. Hodiaŭ, kiam tiuj aranĝoj malpli furoras, tamen neces...

...4-a eldono!

Ĉu vi parolas tendare?
Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rotterdamo: TEJO, 1992 (4-a eld.).
21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde
3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



disfaligo de la vilaĝo. Oni ja povas supozi, ke en tropikaj landoj la kornokapuloj estas multe pli viglaj, malicetaj kaj entreprenemaj ol en malvarmaj landoj, sed eĉ al ni katalikoj la afero aspektas almenaŭ dubinda. Laŭ konfeso de Lucifero, en la vilaĝo estis homoj "logitaj" de eĉ 100 legioj...

Kaj fakte, ĉu estis tiam en la mondo sufiĉe da demonoj por tiaj ondatakoj? Se ni konsideras, ke romia legio havis proksimume 6 000 soldatojn, la ciferoj terure aspektas. Se eblas al Satano

disponi tiom da armeanoj por sturmo al simpla kaj sensignifa vilaĝeto, kio do?

Laŭ la belgo Johannes Vieras, kiu en la jaro 1563 faris la unuan statistikan esploron de la demonaro, la satanaj armeoj konsistis el 72 princoj kaj 7 405 926 soldatoj, do entute 1 111 legioj, ĉiu el ili konsistanta el 6 666 militistoj. Laŭ Vieras la imperiestro estas Belzebuto (ne Lucifero), kaj agnoskas lian aŭtoritaton 7 reĝoj, 7 princoj, 23 dukoj, 13 markizoj, 10 grafoj, 11 prezidentoj, 1 000 nobeloj, 5 minis-

ADO

berto García Fumero, Kubo



1. Ortiz, Fernando: *Historia de una pelea cubana contra los demonios* (Historio de kuba batalo kontraŭ la demonoj), Havano, 1965.

troj, kanceliero, trezoristo, poliestro, generalo, admiralo, 7 ambasadoroj (Francujo, Britujo, Italujo, Turkujo, Ruslando, Hispanujo, Svisujo), ktp. Tion sekvis (1597) statistiko farita de la Patro Othonis Casmanni kaj eldonita sub la titolo *Angelographia* preciziginta eĉ la nomon de la plej elstaraj demonoj. Martinus Barshaus, svisa teologo, kontrolis poste la ciferojn, kaj elkalkulis ekzakte 2 665 866 746 664 diablojn...

La afero en la vilaĝo montriĝis eĉ pli diabla, kiam Lucifero

sciigis, ke sub proksima kaverna estas infera pordo. Laŭ la notario Bartolomé del Castillo, la 4-an de septembro 1682 Patro González (ne estu suspektemaj), kiu estis ankaŭ ano de Inkvizicio kaj eklezia juĝisto, provis elpeli Luciferon el la korpo de la nigrulino Leonarda, sklavino lia, en ĉeesto de la tieaj gravuloj kaj glavuloj. Tamen, la vilaĝestroj tute ne reagis antaŭ kio — sen tro da cerbostreĉo — aspektis dubinda afero, do Patro González decidis alvoki al Dio mem, por ke Li atestu la veron pri la neceso translokiĝi. Laŭ notaria akto, la 9-an de septembro 1682 Patro González per loterio — 4-jara infano elektis slipon — demandis la opinion de la Plejalta pri la translokiĝo... Ĉu vi eĉ ne divenetas la rezulton? Jes, vi pravas... La 15-an de septembro 1682 Patro González kaj deko el la familioj forlasis la vilaĝon kaj translokiĝis al... vi scias. Oni ankaŭ kunportis la homojn posedatajn de la demonoj, kaj ĉiun ekleziaĵon. La vilaĝo restis senpastra, do reen iris la vilaĝanoj antaŭ la insulestro protesti.

La insulestro, apogate de la ekleziaj aŭtoritatoj, kiuj eĉ nomumis inspektoron (la afero odoris je herezo), ordonis al la obstina sacerdote reveni en la vilaĝon kaj ĉion forgesi.

Tamen, la afero faris tiom da bruo, ke la 24-an de januaro 1684 reĝo Carlos La Tria (la ensorĉita) ordonis, ke okazu translokiĝo (diable!) ĉar estis danĝero je pirataj atakoj. La disputo kompreneble daŭris, dum la inferanoj festis.

En 1688 ankoraŭ neniu estis obeinta. Nur en 1689 kelkaj fondis alian vilaĝon (ne tie, kie vi pensas), kiu kun la paso de la jaroj ŝanĝiĝis en la hodiaŭan urban Santa Clara. Tio donis pretekston al la insulestro ordoni la malfondon de Remedios. Denove neniego okazis, do kelkaj perforte bruligis ĝiscindre la vilaĝon. Kompreneble, la insulestro estis devigita denove interveni kaj salomone decidi, ke oni ĝin rekonstruu.

La disputoj daŭris ankoraŭ kelkajn jarojn sed jam ne plu estis tiel akraj. En la jaro 1699 forpasis Patro González kaj tio ŝajne metis finon al la afero, ĉar neniam plu vidiĝis demonoj en Remedios. □

Ami kinon:

Satano ekzistas

La tago de la besto

Originala titolo: *El día de la bestia*

(Hispanujo, 1995)

(Kolora)

Reĝisoro: **Álex de la Iglesia**

Ĉefroluloj: **Álex Angulo,**

Santiago Segura

Okaze de feriado ĉe familioj, surprizis min konstati ke ankaŭ en urbeto interne de Majorko furoras filmo ne nur hispana, sed plene madrida, kvankam en la insulo (for de la turistozaj strandoj) oni parolas ne hispane, sed majorke (t.e. katalune). Temas pri *La tago de la besto*, de Álex de la Iglesia, el la nova skolo aŭ generacio de junaj hispanaj reĝisoroj komencita de Julio Medem kaj Juanma Bajo Ulloa kaj daŭrigata de Chus Gutiérrez, Icíar Bollaín, Agustín Díaz Yanes kaj la opo La Cuadrilla i.a.

Se vi legis pri la *nombre de la besto* en biblio (*Apokalipso*, dio-scias-kie, eble sur paĝo 666), vi certe komprenas la titolon. La filmo temas pri stranga pastro (Álex Angulo) kiu deĉifris la apokalipsajn skribojn de Sankta Johano. Tio donas al li la informon, ke Antikristo tuj naskiĝos, precize la 25-an de decembro 1995, kaj



precize en Madrido. Li do decidis iri tien por trovi la naskiĝejon de Satano kaj detruji lin. Mi rakontu nur, ke en la antikristnaska serĉado helpas lin adoranto de sataneska rok muziko (Santiago Segura). La ceteron provu imagi mem.

Surbaze de tre bona skripto¹, la reĝisoro kun la aktoroj konstruas fluan, agplanan, inteligentan kaj amuzan streĉfilmon, kun konsistaj elementoj kiel sekso, droĝoj, muziko, grotesko (ĉefe t.n. nigra humuro, parenca al la hispana literatura ĝenro *esperpento*²), kaj violento (rasisma kaj novnazia, kontraŭ ciganoj, nigrujoj, magrebanoj kaj almuzuloj, sub la cinika slogano *Purigu Madridon*). Tekniko, la specialaj efektoj kaj trukoj egalas tiujn de multaj senhavaĵaj usonaj duonfilmoj. Kaj ĝia tono ne estas rekte denunca, kvankam sufiĉas spekti la scenojn pri la agado de policistoj, aŭ pri manipulado de la publiko en Berlusconi-stilaj televidaj spektakloj pri astrologio, nifoj³ kaj aliaj transnaturaj fenomenoj.

Resume, jen filmo ĉial rekomendinda. Krom distri kaj ridigi ĝi ankaŭ montras ke, almenaŭ metafore, Satano ja ekzistas. Al mia kapo tuj venas pluraj nomoj: Karaĝiĉ, Mladiĉ, Miloseviĉ, Jelcin... (jen nur kelkaj el longa, tre longa listo).

Jordi Pla i Tauró, Barcelono⁴

¹ skripto: antaŭteksto de kultura produkto, ekz. de filmo.

² En Esperanto legindas la romano *Tirano Banderas*, de R. Vaili Inclán, trad. F. de Diego, kun superbonega enkonduko de A. Valén. Parenteze, la filmo havas multajn komunajn erojn kun la *esperpenta* novelo de G. Kamaĉo, ekz. la statuoj de la falanta anĝelo kaj la oblikvajn

turojn *Pordo Eŭropo* (ĉiuj en Madrido). Eĉ la nomo de unu rolulo, d-ro Eméric Ország, prezentas interesan koincidon precipe se oni konsideras la nomordon en lia lingvo, la hungara.

³ nifoj: ne identigita fluganta objekto.

⁴ El multaj vidpunktoj Barcelono estas samtempe, kaj samgrade, kataluna kaj hispana.

IĜU ĴURNALISTO PER ESPERANTO!

Nun eblas, per la koresponda kurso de TEĴA* por trejnado de ĵurnalistoj, lerni metodojn kaj praktikojn komferte hejme laŭ propra impeto!



Plenigu kaj sendu la suban kuponon al:

*TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO,
ĉe d-ro Paul Gubbins,
3 Arden Court,
Mosley, Congleton,
Cheshire CW12 3JH,
Britio.

Petu provekzempleron de la faka revuo INTERNACIA ĴURNALISTO

Bonvolu sendi al mi informojn pri la PERKORRESPONDA KURSO de TEĴA por TREJNADO DE ĴURNALISTOJ.
Nomo _____
Adreso _____

recenzomanio

15

n-ro 153 (1996:3)

KONTAKTO

Mia unua fojo...

facila

Kara Suzie,

Mi skribas al vi, ĉe la mar-bordo, kie mi pasigas eksterordinarajn feriojn. Krome mi faris ion, kion mi neniam antaŭe faris. Mi nepre deziras tion rakonti al vi.

Okazis iun vesperon, ĉi tie mem, sur la marbordo senhoma. Mi lin ekvidis de malproksime, kaj sendube ankaŭ li rimarkis min, ĉar helkajn minutojn poste ni estis proksimaj unu al la alia je malpli ol helkaj metroj. Ni restis iomete silentaj, kaj poste li al mi diris ion, kaj mi respondis. Ne, verdire mi ne plu scias, ĉu mi respondis. Mi estis kvazaŭ hipnotizita*. Li estis juna, kiel mi. Li estis bela... Kaj tiam, mi ek-tremis*. Mi antaŭsentis, ke mi estas tuj faronta grandan malkovron.

Ĝuste tiam li elirigis sian aĵon kaj ĝin montris al mi. Kaj tuj li ekklarigis, kiel ĝin uzi, kaj montris al mi ĉiujn ĝiajn eblojn.

Vi scias, ke jam delonge ni kune parolas pri tio, sed tiam, la unuan fojon mi estis vidanta tion. Simpla, je la unua uido, sed kiel belega ĝi povas iĝi, se oni ĝin lerte uzas!!! Mi tuj estis konkerita*.

Kiel ĝin priskribi al vi? Verdire, malfacilas, ĉar tio ŝajnas rigida* sed samtempe povas esti plej malrigida. El ĝi oni povas fari preskaŭ ĉion, kion oni deziras, kaj mi ja vidis, ke li estas spertulo en tiu fako.


Kaj li proponis al mi provi. Nur unu fojon, por ke mi almenaŭ spertu, ĉu tio plaĉos al mi: "Se oni neniam provas ion, oni ne povas scii, ĉu oni ŝatos." Lia argumenta* estis prava, tamen, mi unue malakceptis — sed nur por ke li insistu*, ĉar tion mi deziris. Kaj do, mi plu alproksimiĝis, kaj tiam... tiam ĉio vere komenciĝis. Mi mem manipulis* tiun mirindan ilon, mi rapide lernis ĉiujn ĝiajn eblojn, mi... ne eblas ĉion detale rakonti ĉi tie, sed kia memoraĵo!

Post tiu malkovroplena nokto, mi pri tio parolis al geamikoj, kaj nun, ni tion faras plurope — tio eĉ pli bonas kaj dekobligas la plezuron...

Mi estas sen-pacienca* vin revidi por al vi ĉion detale klarigi. Ĝis baldaŭ. Kison de via

Betty

PS: Neniam mi estis vidinta ion tiel potenca*, kaj ankaŭ tiel manipuleblan, kia samtempe estas plezuro en la buŝo. La unuan fojon, mmm... neble traduki skribe la spertitajn sentojn, mi rakontas al vi. Vere, neniam mi forĝos tiun unuan renkonton kun... la internacia lingvo Esperanto.



(El JEUNESPERANTO-INFO 1994:1)

argumento: pravigo de io dum diskuto
hipnotizi: arte estigi dormadon en iu, kiu pli-malpli perdas la mem-regon kaj subiĝas al la volo de la hipnotizanto

insisti: firme kaj daŭre postuli, ke alia agu laŭ nia opinio aŭ deziro
konkeri: ekhavi per granda penado
manipuli: funkciigi per uzo de la mano

pacienca: kapabla atendi
potenca: kapabla forte efiki
rigida: malmolega
tremi: moviĝeti pro malvarmo aŭ timo